

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1975



## Oraj aŭtunaj tagoj



**GEFA kunvenis en Bavario**



Kiu, sincere, konis Treuchtlingen antaŭ la 10a de Oktobro 1975? Ja, kiel gravan kruciĝon de du ĉefaj fervojlinioj, kiun fakton pli ol 300 homoj, loĝantoj kaj travojaĝantoj, pagis per sia vivo dum pluraj bombadoj en la lastaj tagoj de la Granda Milito. La fervojo estis ĝia sorto de kiam en 1869 la reloj ligis la historie signifan, sed malgraviĝintan lokon Treuchtlingen al la bavara fervoja reto. Grave trafis la urbeton nun la likvido de pli ol mil fervojistaj laborlokoj. Kaj la flosanta konkurenco jam pli ol mil jarojn antaŭe komencis fosi la unuan kanalon inter nord- kaj sudeŭropaj akvovojoj. Romianoj projektis duan, bavara Ludoviko sensukcese konstruis trian kaj fine, post 1976 definitive realiĝos prearevo. Ŝipoj, kapacitaj ĝis 1350 toneloj, veturos de tiam el la Nigra Maro al Rotterdam. Granda parto de la rivero Altmühl estos kanaligita, neanstataŭebla natura idilio malaperos por ĉiam! Kiu pagos la projekton kaj ĝiajn sekvojn estas klare konebla, sed kiu profitos ĝin, ankoraŭ dubindas.

Almenaŭ ĉirkaŭ Treuchtlingen la pejzaĝo probable restos netuŝita, ideala startloko por fervojaj, aŭtomobilaj kaj surŝuaj ekskursoj: Rothenburg la romantika, Nördlingen en la lunkratero Ries, Eichstätt kun granda eklezia historio, Dinkelsbühl karakterizanta mezepokon vivantan, aŭ la tute proksimaj pitoreskaj Weißenburg, Ellingen, Pappenheim.

Eble ne necesus tiel longa antaŭparolo por motivigi, ke Treuchtlingen kun longa fervoja historio estis vere ideala loko por nia aŭtuna jarkunveno, ĉar 123 partoprenantoj el 9 landoj sekvis la inviton de GEFA. La festvesperon ĉeestis eĉ ĉ. 260 personoj inkluzive gastojn. Proksimume 400 personojn oni nombris en la ekspozicio, dum la informvespero kaj ĉe la librostando. La ĵurnaloj lokaj kaj regionaj sekve de gazetara konferenco plurajn tagojn kun bildoj raportis pri preparoj, evoluo kaj rezultoj de nia 19a jarkunveno. Apenaŭ iu el Treuchtlingen kaj ĉirkaŭaĵo ne sciis pri la esperantista evento, kio dezirinde — unuaj eĥoj pravas tion — sekvigos pli vastan intereson pri Esperanto kaj la movado en tiuj regionoj. Al malfruaj alvenintoj la urbeto sin prezentis senluma kaj senhoma, sen troaj stratindikoj, aventure sed nedanĝere burĝe. Gojige granda nombro da gekolegoj renkontiĝis jam vendredon en agrabla etoso kun bavara biero,

frankonia vino, rostkolbasetoj sur saŭr-kraŭto kaj instiga muziko, per kiu surprizis k-ĝo Alfred GiBibl. Bonega prelego de s-ano Ney pri Aŭstralio kaj ĝiaj trafikvojoj estis malbone lokigita en tia revida vespero.

Pli frue ol kutime estraro kaj komisiitoj ekkunsideis por trakti en referaĵoj kaj diskutoj la ĉiam tro abundan tagordon. Gravis i. a. la organizaĵoj ŝanĝoj kaj la ne malaktualiganta temo informado-varbado. La interesita reprezentanto de la BSW-ĉefestraro, s-ro Wolf, kun evidenta simpatio kaj propraj kontribuoj partoprenis tiun ĉi kunsidon.

Samtempe okazis la skriba parto de la ekzameno. Kvar kandidatoj sin prezentis al la komisiono. Kvankam la ekzamentaskoj havis atentindan nivelon, tamen ĉiuj kandidatoj sukcesis pruvi sian kvalifikon pri lingva kapableco.

La ceterajn kunvenintojn gvidis la ĉefo de la turisma oficejo, Jupp Scheer, tra Treuchtlingen kaj proksima ĉirkaŭo. Malmultas atestantoj de fora pasinteco, kiujn postlasis ruinigaj tempoj aŭ historiaj eventoj kaj teruraj militodetruadoj. Ŝpuroj de iliraj, keltaj kaj romiaj koloniaĵoj, kanalfoso de Karlo la Granda, komplete disfalinta kastelo el la 13a jarcento estas preskaŭ ĉiom da restaĵoj historiaj. Sed la moderna Treuchtlingen al siaj loĝantoj kaj vizitantoj proponas neatendite grandan skalon da kulturaj, klerigaj, sportaj, refreŝigaj ofertoj.

La posttagmezon tri aŭtobusoj kondukis la ekskursanojn preter aŭtune oraj arbaroj tra pentrindaj lokoj. Unu kulmino de la veturo estis la tro mallonga restado en Eichstätt, episkopa urbo de 741, kiu konservis en katedralo, monaĥejoj palacoj kaj surmonta kastelo nemezureble riĉajn arttrezorojn el diversaj stilepokoj. Profundan impreson postlasis ankaŭ la rapide vizitita fosilio-muzeo de Solnhofen, kiu tiel klare vidigas surteran vivon, antaŭ 150 milionoj da jaroj abrupte rigidiĝintan.

Nia reprezenta sabata festvespero plenigis la grandan salonegon de la urba halo, kie prezidanto Gießner malfermis la kunvenon, salutante gekolegojn el pluraj landoj, interesitajn Treuchtlinganojn, ĵurnalistojn de regiona gazetaro kaj grandan nombron da honoraj gastoj.

„Nun sekvis, iom senrespekte i. a. skribis „Treuchtlinger Kurier“ laŭsence, reciproka aprezo kaj interŝanĝo de donacoj. Bonintencaj salutvortoj kaj bonaj deziroj pri la iom eksterordinara



libertempa okupo vere superŝutis la Fervojistajn Esperantistojn.“ Kiel reprezentanto de la BSW-ĉefestraro kaj ĵus elektita ĝenerala sekretario de FISAIC s-ro Wolf sciigis siajn plej bonajn impresojn pri tiu ĉi jarkunveno; Esperanto por GEFA-anoj estas pli ol tia hobio, kian aliaj libertempaj BSW-grupoj flegadas. Por la direkcia prezidanto kaj la BSW-distrikta estraro atentigis s-ro Hofmann pri la idealismo de la fervojistaj esperantistoj; ĝi estu modela por ĉiuj aliaj kolegoj ankaŭ en la DB-deĵoro. Vicurbestro Baumann, kiu ankaŭ kiel ĥorestro kontribuis al la vespera programo, akcentis la signifon de fervojo kaj fervojistoj por la urbo Treuchtlingen. Kiel membro de GdED-ĉefestraro kaj ties fakestro por klerigaj aferoj, s-ro Marquardt promesis pluan subtenon de la sindikato, ankaŭ en la kadro de sia kleriga laboro. S-ro Tremel parolis la salutvortojn de la sindikato GDBA. Por GDL s-ro Biersack transdonis la bondezirojn de la ĉefestraro. Prezidanto Gießner dankis al ĉiuj tri pro la multjara subteno kaj ilia korporacia membro en GEFA.

La komisiito de Germana Esperanto-Asocio, s-ano Hirsch, kiel ofta gasto de GEFA, salutis la kunvenintaron. Ankaŭ la prezidanto de la germanaj Esperanto-instruistoj, s-ano Behrmann, persone esprimis la bonajn dezirojn de sia faka ligo. La gevira ĥoro kaj kapelo Enzenhofer kadrumis la vesperan programon. W. v. Leeuwen, vicprezidanto de IFEF reprezentis nian Internacian Federacion. Por BEFA, FFEA, Hispanio, la Itala Asocio, JAFE, FERN kaj la svisaj fervojistoj parolis laŭvice L. De Sutter, P. Robiolle, Garcia Amelia, G. Gimelli, Gv. Sredić, Van D'-Hoog, Otto Walder, kiu lasta povis ankaŭ raporti pri sia ĵusa vizito ĉe la ĉeĥoslovakaj kolegoj kaj transdonis iliajn freŝdatajn salutojn al la kunveno.

Ĥorkantoj en nia lingvo, solkantoj de urba konsilanto Georg Wolksi, ankaŭ fervojista kolego, kaj vigla dancmuziko kompletigis la feste gajan atmosferon de tiu ĉi vespero. La gastoj el Treuchtlingen mem ne estis inter la unuaj, kiuj frumatene forlasis la halon.

### **Ekzameno pri lingva kapableco en Treuchtlingen**

En la kadro de nia jarkunveno ankaŭ en tiu ĉi jaro okazis ekzameno pri lingva kapableco. Nia speciala ekzamena komisiono de la Germana Esperanto-

La dimanĉa matineo komenciĝis preskaŭ akurate, kun la sekvo, ke la ekzamenkandidatoj kaj ilia publiko bonedukite haltis antaŭ la salonega pordo, kiam „Solveig“ Wiesmann per sia sonoriklara soprano jam fandis la neĝon lastvintran. Prezidanto Gießner komentis la jarraporton pri la pasinta laborperiodo. Majstrecan pianokoncerton prezentis Elisabeth Ritterspach, kiu ankaŭ pianoforte akompanis la kantojn de Anni Wiesmann. Folkloraj dancoj plaĉis al la spektantoj. Ravis speciale la ĉarmo de la plej juna aktoroparo, kiu siajn florajn ovaciaĵojn akceptis kun tre malsama temperamento. Alia grupo fingrokroĉe demonstris bavaran popolsporton.

La sonfilm-prezento de W. Barnickel tre ĝenis la neperfekte, pli vere apenaŭ ebla malheligo de la salonego, bedaŭrinde pro lerta kompilado kaj bonega kolorkvalito de la verko. Dezirinde, ke multaj grupoj havus okazon vidi la memorojn pri la pasinta laborperiodo. Majstrecan fantazio kaj sperto.

Adiaŭa humoro ĉirkaŭ la dimanĉa tagmezo, multaj manoj sin skuas reciproke: „Ĝis revido en Svedio aŭ pli frue!“

Ludwig Pickel enpakas siajn librojn. La ekspoziciaj tabuloj ŝanceliĝas demuntate; ili ja estas kvazaŭ heredaĵo de nia amiko Kurt Jentsch, kies neatendita morto nin konsternis.

La sukcesa pasigo de tiuj ĉi tagoj pravigis la elekton de ĝuste tia loko, kaj multajn dankojn meritas estraranoj, komisiitoj, la aktivaj kunlaborantoj en la programo kaj en multegaj pli-malpli grandaj servoj, la komprenemo de la BSW-distriktestraro kaj certe ne laste ties loka reprezentanto Attmannspacher.

La ekspozicimaterialo restos ĝis venonta bezono en Treuchtlingen. Ĝi cetere ricevis kiel ampleksan kompletigon serion da ilustriaj tabuloj el la mano de kapabla juna grafikisto Lothar Weidacher, esperiga filo de nia munkena kolego.

Utilas jam noti la daton de nia 20a jarkunveno 8. – 10. 10. 1976 en Paderborn (distrikto Essen), kiu lastatempe tre vaste konatiĝis pro siaj esperantistaj aktivecoj.  
wbr.

Instituto konsistis en Treuchtlingen el la kolegoj Ritterspach, Barnickel kaj Brandenburg. Kvar kandidatoj partoprenis – niaj kolegoj Krüger el Heilbronn, Müller el Saarbrücken kaj Rösemann el Hannover krome s-ano Maier, nefervojisto



el Augsburg. La kvar skribajn kaj la du buŝajn taskojn solvis ĉiuj kvar kun la finrezulto „bone“. Ni kore gratulas! La eseeto de s-ano Maier estas tiel interesa ke ni — kun afabla permeso de li — publikas ĝin ĉi tie.

(Lautenbach)

### Se mi estus riĉa

La problemo ne estas „se mi estus riĉa“ sed „ke mi ne estas riĉa“. Kompreneble tio estas problemo de la plej multaj homoj. Sed mi ja nur skribu pri mi. Oni ja povus skribi verkon, novelon

ktp. kaj ili povus doni profiton. Sed nun: **Se mi estus riĉa.**

Do, oni devas imagi tion en la sekvonta maniero: Mi donus la duonon al malriĉaj homoj, kaj la alian duonon mi donus al mia miinon, ĉar ŝi ja krom tio administras miajn posedaĵojn. Sed mi kuŝigus min en aŭtuna herbejo, fajfus decajn kaj maldecajn kantojn kun la birdoj, — mi kompreneble fajfus kantetojn en Esperanto — kaj mi meditus pri grandaj problemoj de mia vivo, eszemple pri la tre interesa demando: Kion mi farus se mi estus malriĉa?

## Jarraporto pri la periodo inter la 18a kaj 19a jarkunvenoj

**Antaŭrimarkigo:** Studante la raporton, bonvolu kompari la pasintjaran.

El niaj membroj mortis:

Anton Fath (69)	2. 8. 1974
Wilhelm Becker (82)	13. 2. 1975
Wilhelm Bulla (90)	13. 4. 1975
Manfred Petelkau (45)	25. 4. 1975
Ludwig Keil (78)	21. 6. 1975
Kurt Jentsch (68)	6. 10. 1975

La memoro al ili restos inter ni.

### Organizaj aferoj

Por 1975 GEFA kotizis al IFEF por 846 membroj (individuaj kaj korporaciaj). La jarkotizo estas 6 GM, unu GM pli ol lastjare.

La **laborkonsilantaro** kunvenis dufoje kun la distriktaj komisiitoj (Bamberg kaj Frankfut/M), krome en Decembro en Rosenheim.

### Personaraj ŝanĝoj

a) **en la estraro:** Kurt Jentsch eksiĝis pro sia aĝo kaj ne tute bona sanstato el la kasista ofico. La 1an de Januaro 1975 Karl Bernhard (Bf Frankenthal) transprenis la kason.

Ek de la 19a jarkunveno la sekretariino Elfriede Kruse transdonos la sekretariajn taskojn al Joachim Schrapp (Münster). Ŝi tamen por kelka tempo daŭrigos la administradon de la BSW-financrimedoj.

b) **specialaj komisiitoj:** Heinz-Dieter Hartig (Bw Bremen Hbf) intertempe transprenis la materialon pri terminaraj aferoj kaj ek de nun estos la oficiala reprezentanto de GEFA ĉe la Terminara Komisiono de IFEF. Ni estas certaj, ke Gernot Ritterspach, kiu por sia longjara terminara laboro 1971 ricevis la arĝentan FISAIC-medalon, ankaŭ estontece nin helpos per siaj spertoj kaj konsiloj. Al Heinz-Dieter Hartig ni deziras sukceson kaj ĝojon en lia laboro.

c) **distriktoj:** Ne plu ekzistas la distriktoj Kassel, Münster/W kaj Wuppertal. La ĝistiamaj komisiitoj Thasler (Kassel) ĉesis sian laboron, Schrapp (Münster/W) eniras en la estraron kaj Graß (Wuppertal) daŭrigas sian jam longjaran kunlaboron en la estraro. La ceteraj komisiitoj ne ŝanĝiĝis.

### Kursoj

Nur iom pli favora situacio. En 1974 komenciĝis 8 kursoj (pasintjare 6). Grava tasko de la kursgvidantoj ja estas, per interesa instruado teni la lernantojn ĝis la fino. Tamen same grava tasko estas, poste zorgi, ke la kursanoj ne perdiĝos aŭ restas surpaperaj membroj, sed ke ili kompletigos siajn bazajn sciojn en la grupoj kaj per korespondado aŭ eĉ personoj kontaktoj.

Jen unu el la plej necesaj agadkampoj por la grupoj kaj distriktaj komisiitoj.

### Ekzamenkomisiono

La en 1974 renovigita komisiono ekagis en la 18a jarkunveno, kie ĝi ekzamenis 3 kandidatojn.

### Kunlaboro en IFEF

Partoprenis 111 el niaj membroj en la 27a IFEF-Kongreso en Villach. Nia membro W. Heimlich jr. tie estas elektita junulara kromkomitatano. En la nove fondita speciala komisiono por verbado/informado kunlaboras W. Brandenburg, kiu ankaŭ daŭre gvidas la Fakprelegan Komisionon kun O. Rösemann kiel sekretario. Nova kunlaboranto en la Terminara Komisiono estas H.D. Hartig. En la estraro daŭre aktivas J. Gießner kiel prezidanto kaj E. Kruse kiel sekretariino. Pro siaj multnombraj meritoj sur internacia kaj nacia niveloj Elfriede Kruse ricevis — en la Jaro de la Virino — en Villach la oran medalon de la FISAIC.



## **Kontaktaj, aranĝoj**

La raportjaro komenciĝis per la **18a jar-kunveno en Bamberg** (11.—13.10.1974) kun 123 partoprenantoj (sabaton vespere ĉ. 200). Gastoj ĉeestis el 8 aliaj landoj. Gazetarkonferenco kaj speciala ekspozicio zorgis por publikigo. Kiel kutime labor-kunsidoj, turisma kaj kulturaj aranĝoj prezentis varian programon. La urbestro akceptis kaj regalis ĉiujn ĉeestantojn.

Membroj de GEFA partoprenis en diversaj jarkunvenoj de aliaj IFEF-sekcioj, en la Universala Kongreso Kopenhagen, en la Internacia Skisemajno en Plan (Sudtirolo) kaj en la Feriosemajno en Svislando. Daŭras la kontaktoj kun la fervoja Sociala Organizo BSW. Ili estas influigitaj/ataj de la ĝenerala krizo, en kiu troviĝas la Germana Federacia Fervojo. Tio ekz evidentiĝis, kiam la BSW-ĉefestraro en Februaro 1975 postulis de GEFA, ke la preparoj por la 19a jarkunveno en Garmisch-Partenkirchen devis esti ĉesigitaj kaj nova kunvenloko (Treuchtlingen) devis esti elektita, kiu situas pli centre ol Garmisch. Tio kaŭzis sufiĉe da aldona preparlaboro por la urĝanta tempo. La instancoj en Treuchtlingen kaj la BSW-distrikto München kompreneme helpis en tiu ĉi malfavora situacio.

Plue ni kunlaboras kun Germana Esperanto Asocio, kies korporativa membro ni estas, ĉefe sur loka nivelo, krome kun Germana Esperanto-Instituto kaj Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

### **Informado**

Nia komunikilo „Bulteno“ aperis kvinfoje kun 34 paĝoj (eldonkvanto 1300), do entute en grave reduktita amplekso. Kaŭzoj estis, ke la prezoj konsiderinde plialtiĝis unufanke kaj malkresko de disponeblaj financrimedoj aliaflanke. Pro tio ankaŭ la speciala informnumero, kiun ni dum kelkaj jaroj eldonis en germana lingvo, ne povis aperi.

Ĉiuj ĝisnunaj informeblecoj pere de Sozialblatt, BSW-Raport kaj BSW-distriktrevuetoj ekde 1975 ne plu ekzistas,

ĉar ne plu aperas. Anstataŭas ilin la nova entreprena revuo „Wir“ („ni“), kiu ja disponigas al la kulturaj asocioj iom da loko, sed nur tre limigita kompare al iama tempo. Ni tamen eluzas ĉiun eblecon. Por oficialaj novaĵoj ni utiligas la oficialajn indikilojn de DB (Amtsblätter) kaj ankaŭ la sindikataj revuoj ĉiam aperigas notojn pri niaj aranĝaĵoj, same „Die Bundesbahn“. En tagaj gazetoj 125 artikoloj pri nia laboro estas konstatitaj, krome unu televida informo, du radio-intervjuoj.

La rezolucio farita en Villach aperis germanlingve en la Bulteno kaj estas sendita al la BSW-ĉefestraro same kiel al la prezidanto de FISAIC.

La konata broŝuro de la Socialdemokrata Partio itala estas fintradukita kaj en kunlaboro kun GEA presita en 3500 ekzempleroj, disdonitaj al parlamentanoj, komunumanoj kpt en Germanio kaj Aŭstrio.

Nia membro Erwin Böhm en germanan lingvon tradukis artikolon el „Popola Ĉinio“ pri la konstruado de nova fervoja linio, kiun ankaŭ la Dokumenta Servo de DB envicigis en siajn klasifikaĵojn kaj dissendis ĝin al servoj de aliaj fervojoj. Ankaŭ radio Romo menciis tiun publikaĵon.

La migra ekspozicio de Kurt Jentsch denove estas prezentita kelkloke kaj altiris pli ol mil vizitantojn. Rekomendindas vaste utiliĝi ĝin.

### **Junularo**

Bedaŭrinde nenio grava raportebla.

### **Emerituloj**

Pro tempomanko ni ne povis organizi apartajn renkontiĝojn por la emerituloj en 1974. Sed ĉar BSW disponigis monon, ni povis sendi al ili kristnaskan donacon en formo de libro.

En 1975 ni kunvenigis niajn maljunulojn el la nordokcidenta parto en Osnabrück (5.7.), tiujn el la sudo en Treuchtlingen (10.10.).

G i e b n e r

## **Jahresbericht über den Zeitabschnitt von der 18. zur 19. Jahresversammlung**

(Auszugsweise Übersetzung aus dem Esperanto-Original)

### **Personelle Veränderungen**

#### **a) im Vorstand**

Kurt Jentsch ist ab Ende 1974 aus Alters- und Gesundheitsgründen als Kassierer ausgeschieden. Nachfolger: Karl Bernhard, Bf Frankenthal.

Ab 19. Jahresversammlung übernimmt Joachim Schrapf, SV Nord in Münster (Westf), die Aufgaben des Sekretärs. Elfriede Kruse besorgt weiterhin die Verwaltung der Wirtschaftsmittel.

#### **b) Beauftragte für Sonderaufgaben**



Gernot Ritterspach übergab die Bearbeitung des Fachwörterwesens in die Hände von Heinz-Dieter Hartig, Bw Bremen Hbf.

#### c) Bezirke

Die Bezirke Kassel, Münster/W und Wuppertal sind endgültig weggefallen. Die **Bezirksbeauftragten** Thasler (Kassel) beendete seine Arbeit, Schropp (Münster) wurde Vorstandsmitglied und Graß (Wuppertal) setzt seine Arbeit im Vorstand fort.

#### Kurse

In 1974 wurden 8 Sprachkurse durchgeführt.

#### Prüfungskommission

Die 1974 neu aufgestellte Prüfungskommission hat in der 18. Jahresversammlung 3 Bewerber geprüft.

#### Mitarbeit in IFEF

111 unserer Mitglieder nahmen am 27. IFEF-Kongreß in Villach teil. Werner Heimlich jr wurde dort als einer der beiden Jugendbeauftragten gewählt. In dem neu gebildeten Ausschuß für Werbung/Information arbeitet Willi Brandenburg mit, der auch weiterhin den Ausschuß für Fachvorträge leitet mit Otto Rösemann als Sekretär. Neuer Mitarbeiter im Ausschuß für Fachwörterangelegenheiten ist H. D. Hartig. Im IFEF-Vorstand sind weiterhin Joachim Gießner als Präsident und Elfriede Kruse als Sekretärin tätig. Für ihre zahlreichen Verdienste auf internationalem und nationalem Gebiet erhielt Elfriede Kruse im Jahr der Frau in Villach die Goldmedaille der FISAIC.

#### Kontakte, Veranstaltungen

Das Berichtsjahr begann mit der 18. Jahresversammlung in Bamberg (11.-13.10.1974) mit 123 Teilnehmern (am Sonnabend 200), darunter Gäste aus weiteren 8 Ländern. GEFA-Mitglieder nahmen auch an Jahresversammlungen anderer IFEF-Landesverbände teil, dgl. am Allgemeinen Weltkongreß in Kopenhagen, an der Internationalen Skiwoche in Plan (Wolkenstein) Südtirol und an den Ferienwochen in der Schweiz.

Die Zusammenarbeit mit dem BSW wurde von der allgemeinen Krise der DB beeinflusst. U.a. mußten die Vorbereitungen für die 19. Jahresversammlung, die für Garmisch geplant war, rückgängig gemacht werden. Als neuer Tagungsort wurde Treuchtlingen bestimmt. Die Stadt Treuchtlingen und der BSW-Bezirksvorstand München haben uns diese Situation sehr erleichtert.

Weiterhin arbeiten wir mit dem Deutschen

Esperanto-Bund, mit dem Deutschen Esperanto-Institut und dem Internationalen Esperanto-Museum in Wien zusammen.

#### Information

Das Mitteilungsblatt „Bulteno“ erschien 5mal mit 34 Seiten (Auflage 1300), d. h. also in wesentlich schwächerem Umfang als bisher (erhöhte Kosten, weniger Mittel). Deshalb konnte auch die deutschsprachige Informationsnummer nicht erscheinen. Die bisherigen Informationsmöglichkeiten über Sozialblatt, BSW-Report, BSW-Zeitungen usw. sind entfallen. Es steht nur noch die Unternehmerzeitschrift „Wir“ mit sehr beschränktem Raum zur Verfügung.

Kürzere Nachrichten veröffentlichen wir über die Amtsblätter. Die Gewerkschaftszeitungen bringen Notizen über unsere Veranstaltungen, dgl. „Die Bundesbahn“. In der Tagespresse wurden 125 Veröffentlichungen über unsere Arbeit festgestellt, außerdem eine Fernsehsendung und 2 Radiointerviews.

Die in Villach gefaßte Kongreßresolution erschien in Deutsch im Bulteno und wurde u.a. dem BSW-Hauptvorstand und der FISAIC zugeleitet.

Die bekannte Broschüre der Sozialdemokratischen Partei Italiens wurde von uns übersetzt und in Zusammenarbeit mit dem Deutschen Esperanto-Bund in 3500 Stück hergestellt. Sie wurde an Parlamentarier und andere Politiker in Deutschland und Österreich verteilt.

Unser Mitglied Erwin Böhm hat aus der chinesischen Zeitschrift „El popola Ĉino“ einen Artikel über den Bau einer neuen Eisenbahnlinie in China übersetzt. Der Dokumentationsdienst der DB hat die Übersetzung aufgenommen. Auch im Radio Rom wurde diese Facharbeit erwähnt. Die Wanderausstellung, aufgestellt von Kurt Jentsch, hatte im Berichtsjahr mehr als 1000 Besucher zu verzeichnen.

#### Senioren

In 1974 fanden keine besonderen Veranstaltungen statt. Es wurden jedoch Buchgeschenke zu Weihnachten verteilt. In 1975 fand je ein Treffen für den Norden (am 5.7. in Osnabrück) und für den Süden (am 10.10. in Treuchtlingen) statt.

Gießner

#### Was unsere Gäste zum Begrüßungsabend der 19. Jahresversammlung sagten:

**BDir. Wolf**, Mitglied des BSW-Hauptvorstandes Frankfurt/M:

Esperanto ist mehr als ein Hobby, es ist eine Aufgabe, um sich über die Grenzen hinweg mit anderen Völkern in Verbindung



zu setzen.

Es hat einen hohen Nützlichkeitsgrad und schafft dauernde Freundschaften.

**Lt. Dir. Hofmann**, Vorsitzender des BSW-Bezirksvorstandes München:

Es ist eine schwierige Zeit für die Eisenbahner. Aber Ihr Idealismus sollte beispielhaft sein für alle unsere Kollegen. Ich wundere mich über Ihren Einsatz und bewundere Sie. Gerade dieses Mutes und dieser Hingabe wegen lebt Esperanto.

Leiter des Bildungswesens beim GdED-Bundesvorstand, Kollege **Marquardt**:

Ich sehe in Ihrer Arbeit vor allem 3 Elemente:

- sich mit anderen zu verständigen
- andere Menschen zu verstehen
- Freundschaften zu pflegen

Wir werden Ihre Bemühungen auf diesen Gebieten mit allen Kräften unterstützen.

Im Auftrage des GDBA-Hauptvorstandes, Kollege **Tremel**:

Ihre gemeinsame Sprache möge dazu beitragen, daß die Völker friedlicher miteinander leben können.

Im Auftrage des GDL-Hauptvorstandes, Kollege **Biersack**:

Wünsche der Vereinigung allzeit sichere und gute Fahrt.



Proksimume 400 personojn oni nombris en la ekspozicio

### **Novajoj el la estraro**

Ekde la jarkunveno en Treuchtlingen la GEFA-estraro funkcias en iom alia konsisto ol ĝis nun. Jen sekvas la nomoj kaj taskoj:

- Gießner Joachim, prezidanto, komisiito ĉe BSW-ĉefestraro, respondecas pri la financrimedoj kaj al BSW.
- Graß Willi, vicprezidanto, redaktoro

- Schrupp Joachim, sekretario
- Kruse Elfriede, administras la financrimedojn de BSW
- Bernhard Karl, administras la havaĵojn de GEFA,
- Brandenburg Willi, informado, varbado, fakprelegaj aferoj,
- Hartig Heinz-Dieter, terminaraj aferoj,
- Heimlich Werner jr., junularaj aferoj.



La du gravaj ŝanĝoj videblas ĉe la oficoj de la sekretario kaj de terminaraj aferoj. Estis necese sensarĝigi s-inon Kruse, kiu ja de preskaŭ 8 jaroj plenumis du sekretariajn postenojn, nome en GEFA kaj en IFEF. Kun kontento ni tamen konstatas, ke ŝi ne plene forlasis la vicajn de la germana estraro, sed plue administras la BSW-financojn, tre agrabla decido pro ŝia favora proksimeco al la BSW-ĉefinstancoj. Ne eblas esprimi per vortoj la dankon pro ĉio, kion ŝi faris por GEFA jam de 1957. La prestiĝo de nia landa asocio sen ŝi ne estus pensebla. Kaj kun ĝojo ni bonvenigas kolegon Schrapp, kiu senhezite plenumis nian peton, transpreni la sekretariajn laborojn de GEFA. Ni deziras, ke tiuj

laboroj estu por li agrabla kompletigo de liaj ĉiutagaj taskoj. Same kan ĝojo ni notas la pretecon de kolego Hartig, kiu kun elano saltis en la problemaron de la terminara laboro, kiun lia antaŭulo Gernot Ritterspach post preskaŭ 20 jara agado ĉefe pro deĵoraj kaŭzoj ne plu povas kontraŭbatali. Kolego Ritterspach oficiale distingiĝis en Maribor per la arĝenta medalo de la FISAIC. La evoluo de la terminara laboro de GEFA kaj IFEF certe neniam estos imagebla sen la nomo Ritterspach. Ni jam raportis pri la ŝanĝo lastjare kaj deziras al kolego Hartig, ke li plene sukcesos en tiu ĉi malfacila kampo de nia faka laboro kaj en Germanio kaj sur internacia tereno. prezidanto

#### Wieder zwei Seniorentreffen 1975

Wir leben in einer Zeit, geprägt vom Streß, der auch vor alten Menschen nicht Halt macht. Wenn es auch nur die Reklame ist, die ihn allenthalben auf den Straßen bedrängt oder ihn durch Radio und Fernsehen ins Heim verfolgt. Auch der alte Mensch also ist vielen Umwelt-einflüssen ausgesetzt und muß sich noch dazu nach Absolvierung seines Arbeits-

lebens vom Tage seines Eintritts in das „neue Leben“ an mit vielen neuen Umständen und wohl gar nicht immer mit glücklichen abfinden. Mancher wird dann bisweilen zurückdenken an „früher“, an alte Kollegen, den damaligen Arbeitsplatz, an Freunde, mit denen gemeinsame Erlebnisse verbinden. Hier nun ist der Punkt, an dem die alte Gemeinschaft sich als



Empfang beim Seniorentreffen Osnabrück im Friedenssaal des Rathauses



stark genug erweisen sollte, um auch weit in den Ruhestand hinein zu wirken. Und es ist eine wahrhaft menschenfreundliche Idee, die das BSW hier immer wieder verwirklichen hilft, indem es die Durchführung besonderer Veranstaltungen für unsere ehemaligen Aktiven moralisch und finanziell unterstützt.

So konnten wir in diesem Jahre wieder 2 Treffen für unsere pensionierten Mitglieder veranstalten. Und um es gleich vorwegzunehmen: sie waren, wie auch schon frühere Zusammenkünfte dieser Art, ein schöner Erfolg. Die Teilnehmer der nördlichen Bezirke trafen sich am 5. Juli. Der Bezirksbeauftragte Werner Heimlich begrüßte etwa 25 Gäste im Namen des BSW-Vorstandes Hannover in der Bahnhofsgaststätte Osnabrück. Joachim Gießner überbrachte Grüße des BSW-Hauptvorstandes. Eine kurze Omnibusfahrt führte zum Rathaus, wo die Stadt in dem berühmten Friedenssaal einen Empfang gab, zweifellos ein beeindruckendes Erlebnis bei solch einem Treffen. Die südliche Zusammenkunft war mit der 19. Jahresversammlung gekoppelt und fand am 10. Oktober in Treuchtlingen

statt. Hier war es Josef Weidacher, der Bezirksbeauftragte des Bezirks München, der neben seinen umfangreichen Aufgaben bei der Organisation der Jahresversammlung noch Zeit fand, die Senioren zu begrüßen. Joachim Gießner übermittelte auch hier die Grüße des Hauptvorstands. Der sonnendurchflutete Saal des Freizeitheims war durchaus die richtige Begegnungsstätte.

Beiden Treffen gemeinsam waren wieder lebendiger Gedankenaustausch und auch kleine humorvolle Darbietungen aus dem Kreise der Teilnehmer, ergänzt durch ein schmackhaftes Essen. Beim Abschied wurde schon der Wunsch nach dem nächsten Treffen geäußert.

Hier soll schließlich nicht der Dank vergessen werden an Otto Rösemann und Willi Graß für die Vorbereitung der Zusammenkünfte und an Elfriede Kruse für die unermüdliche „Verwaltungsarbeit“ hinter den Kulissen. Wie drückten es unsere „Alten“ aus? Schon früher und auch heute noch hat Esperanto unser Leben bereichert. Wir möchten es nie missen.

Gießner

## El la grupoj

**München:** Kelkaj esperantistoj de Munkeno, speciale Josef Weidacher kaj Horst Spirat, investis multe da tempo, energio kaj mono por realigi Esperanto-ekspozicion la 6an, 7an kaj 8an de Septembro en la kunveno „Holzkirchner Bahnhof“. Krom la konata materialo de GEFA oni preparis sufiĉe multajn kaj informriĉajn tabulojn. Libroservo Pickel ĉeestis kun librostando. La ekspozicion vizitis ĉ. 120 personoj, inter ili veraj novaj interesuloj. Lndon vespere, studprofesoro Thalheimer, Landshut, prezentis lumbildprelegon, kaj Horst Spirat donis malgrandan provlecionon. Tiun kunvenon ĉeestis ĉ. 50 personoj. Dum la ekspozicio oni povis konatiĝi kun la instruprogramo kaseta por Esperanto de la firmao Intertip. Por la preparo de la ekspozicio la loka Esperanto-Grupo kaj la fervojista Esperanto-grupo elspezis ĉ. 1000 GM.

**Nürnberg:** Lndon, la 25an de Aŭgusto 1975, la GEFA-grupo Lichtenfels aranĝis bone frekventitan lumbild-vesperon en la

fervoja restoracio. Grupestro Hans Müller vekis rememorojn pri la tiujara IFEF-kongreso kun ampleksa serio de kolorlumbildoj. Membro Hardo Wendt, Coburg, montris el abunda sortimento memorbildojn de sia vojaĝoj al Usono en Majo 1975. Hazarde GEFA-redaktoro kun edzino feris en Lichtenfels kaj partoprenis tiun sukcesplenan grup-vesperon en amika rondo.

**Bremen:** La membroj, kiuj ne feris, kunvenis la 5an de Julio en la ĝardeno de s-ro Hartig. Estis senceremonia plezuro. Ludante, babilante kaj ripozante ni pasigis agrablan posttagmezon. Sur lignokarba fajro ni rostis kolbasetojn. La 13an de Aŭgusto prelegis s-ro Buchwald pri la IFEF-kongreso. Tre lerte li priskribis ĉiujn eventojn kaj akcentis la modelan organizon de la kongreso. Sekvis dia-serio pri la sama temo. Samtage ni vidis lumbild-serion „Ĝardenon — mia hobbio“, kiu stimulis la nia **Lanternfesto** la 16an de Aŭgusto. Tiu festo preskaŭ subakviĝis en abunda



pluvo! Tamen kunvenis multaj membroj. Sidante en la ĝardena dometo ni babilis kaj trinkis — kaj la humoro ne mankis.

Kiam krepuskis la pluvo ĉesis, tiel ke ni komune povis ornami la ĝardenon per multkoloraj lanternoj, kaj ankaŭ la neevitebla kolbasrostado bonguste funkciis. Estis iom eksterordinara sed tre gaja aranĝo — precipe por la partoprenintaj infanoj.

Gastis ĉe ni:

20 francoj, veturante karavane al UK, restis du tagojn en Bremen. Ni gvidis la gastojn tra nia urbo. Vespere ni kunvenis.

Du bulgaroj gastis du tagojn ĉe Dieter Hartig. Varia programo kontentigis evidente ĉiujn gastojn.

La 17an de Septembro ni komencis novan kurson.

Hartig

**Redaktfino por n-ro 1/1976  
estas la 15. 1. 1976**

## **Schweden, Kongreßland 1976**

Über unser Kongreßland werden Sie in der Bulteno-Ausgabe 1/1976 lesen. Der Anmeldeschein mit Zimmerbestellvordruck dürfte mit der IF-Ausgabe Nr. 6/75 verteilt werden. Auf Seite 2 des Anmeldescheins lfd. Nr. 14 — Frist 28. 2. 76 für die geringere Teilnehmergebühr — empfehlen unsere schwedischen Freunde die günstigsten Reiseverbindungen über Trelleborg bzw. Kopenhagen. Vorschläge über gemeinsame Liege- bzw. Schlafwagenreservierung bzw. Flugverbindungen stehen noch aus.

Nach dem bisher vorliegenden Winterfahrplan, der bis zum 29. 6. 76 gültig ist, kann folgende Verbindung empfohlen werden:

Donnerstag ab Köln	22.32 Uhr
Freitag an Kopenhagen	8.59 Uhr
an Stockholm C	17.44 Uhr
Samstag an Skellefteå	8.31 Uhr.
	Grab

**Kanto por Erika Landgraf okaze de ŝia elekto kiel „Miß Esperanto“ dum la 27a IFEF-kongreso en Villach. Melodio laŭ la germana studentkanto: O alte Burschenherrlichkeit. Teksto: Heinz Schindler.**

De l' fama Nürnberg venis ŝi,  
la dolĉa belulino.  
Kongreson partoprenis ŝi  
en Villach, la fraŭlino.  
Ŝi estas blonda germanin'  
kaj ĉiu jam admiris ŝin.  
Altiviu la knabino  
Erika, belulino.

Ĉe l' Esperantojunular'  
ŝi estas tre ŝatata,  
ĉe l' skisemajno-amikar'  
ŝi estas jam konata  
pro sia ĉarmo kaj sportec'  
kaj sia granda afablec'.  
Altiviu la knabino  
Erika, belulino.

Konkurs' dum junularvesper'  
pro la plej bela ino  
ĝojigis nin, sed kun esper',  
ke venku la knabino.  
Kaj estas elektita ŝi,  
„Miß Esperanto“ estas ŝi.  
Altiviu la knabino  
Erika, belulino.



**Erika Landgraf kiel  
„Miß Esperanto“ 1975**



**El la Regulo Esperanta**

Jen la kvara el la 16 reguloj:

④ La numeraloj fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la signado de la numeraloj ordaj oni aldonas la finaĵon de la adjektivo; por la multoblaĵ - la sufikson „obl“, por la nombronaj - „on“, por la kolektaj - „op“, por la disdividaj - la vorton „po“. Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbiaj.

Verwandeln Sie folgende fünf Eigenschaftswörter in Hauptwörter und bilden Sie daraus Sätze.

**Benutzen Sie Ihre Lehr- und Wörterbücher!**

Nigra; ordinara; inklina; blua; vera. Beispiel: bona - bono. La homoj senĉese celadas al sia bono. (Z)

**Fügen Sie folgende Verhältniswörter ein:**

ekster, al, en, sur, apud, antaŭ, dum. La birdo flugis ..... la ĝardenon, ..... la tablon.

Li loĝas ..... la urbo. .... la oka mi iris ..... la oficejo kaj laboris ..... kelkaj horoj. .... la tuta tago li laboris ..... mi ..... la sama ĉambro. Ne laŭdu la tagon ..... vespero!

**El Proverbaro Esperanta**

„Kiu forton ne havas, ĉiam malpravas.“  
 „Antaŭ la lango laboru la cerbo.“  
 „Sen fajro ne brulas eĉ pajlo.“

Hartig

**Noch ein Beitrag zum „Jahr der Frau“**

**Die Frau ohne Beruf**  
 (Verfasser unbekannt)

„Ohne Beruf“, so stand es im Paß.  
 Mir wurden fast die Augen naß.  
 „Ohne Beruf“, war da zu lesen,  
 und sie war doch das nützlichste Wesen.  
 Nur für andere zu sinnen, zu sorgen,  
 war ihr Beruf vom frühen Morgen  
 bis in die Tiefe der langen Nacht,  
 nur für der ihren Wohl bedacht.  
 Gattin, Mutter, Hausfrau zu sein,  
 schließt das nicht alle Berufe ein?  
 Als Köchin von allen Lieblingsspeisen,  
 als Packer, wenn es geht auf Reisen,  
 als Chirurg, wenn ein Dorn sich im Finger  
 [versplittert,  
 Schiedsmann bei Kämpfen erbst und  
 [erbittert,  
 Färber von alten Mänteln und Röcken,  
 Finanzgenie, wenn sich der Beutel soll  
 [strecken.  
 Als Lexikon, das schier alles soll wissen,  
 als Flickfrau, wenn Strümpfe und Wäsche  
 [zerrissen.  
 Als Märchenerzählerin ohne Ermüden,  
 als Hüterin des Hauses Frieden,  
 als Pupp doktor, als Dekorateur,  
 als Gärtner, Konditor oder Friseur. —  
 Doch soll der Drucker nicht länger sich  
 [plagen,  
 unzählige Titel könnt' ich noch sagen  
 von Frauen, die Gott zum Segen erschuf.  
 Und das nennt die Welt dann ohne Beruf!

**Ankoraŭ kontribuo okaze de l' „Jaro de la Virino“**

**La virino sen profesio**

tradukis: Joachim Gießner  
 „Sen iu profesio“, eldiras la pasporto.  
 Ĉu povas esti vere? Al mi ja mankas vorto.  
 Kaj fakte jen mi legas: „Sen iu profesio“.  
 Sed male, evidente utilas ŝi por ĉio.  
 Cerbumi nur kaj zorgi, labori por aliaj  
 ja estas profesio. Per pensoj, manoj siaj  
 matene ŝi komencas ĝis longe en la nokto,  
 por l'bono de la siaj, ŝin ne kontrolas  
 [vokto.  
 Edzin', patrin', mastro en familia domo  
 inkludas profesiojn sennombrajn de la  
 [homo.  
 Ŝi klare kompetentas tagtage por  
 [manĝaĵoj.  
 Pakisto ŝi fariĝas por famili-vojaĝoj.  
 Kirurgo, se en fingro pikiĝas dorn-doloro,  
 juĝisto en kvereloj kaj pro amara ploro.  
 Ŝi novtinkuras robojn, mantelojn  
 [eluzitajn,  
 genie ŝi financas monujojn tro streĉitajn.  
 Vivanta leksikono por ĉio en la mondo  
 kaj flikas la tolaĵon por ĉiu en la rondo.  
 Fabelojn ŝi rakontas, sen nur fariĝi laca,  
 kaj daŭre priatentas, ke l'domo estas paca.  
 Kuracas pupojn, estas eĉ dekoraciisto,  
 prizorgas la ĝardenon, kaj estas jen frizisto.  
 Nun tamen la presiston mi ne pli longe  
 [plagas,  
 ĉar multajn profesiojn ankoraŭ mi imagas  
 de inoj, kiujn kreis por l' ben' de 'homoj  
 [Dio. —  
 Sed diras la pasporto: „Sen iu profesio“.



### Nekrologo

Ne pasis tro longa tempo, kaj jam denove GEFA perdis unu el siaj plej aktivaj membroj. La 6an de Oktobro 1975 subite forpasis

#### Kurt Jentsch

en la 68a vivojaro. Li troviĝis enmeze de la preparoj por la 19a jarkunveno, kie li, kiel jam kutime en la pasintaj jaroj, intencis mem starigi kaj prezenti sian kreaĵon, la Migran Ekspozicion de GEFA. Severa sorto ne plu permesis tion al li.

Kurt Jentsch, kiu naskiĝis la 19.2.1908, estis honesta homo kiel malofte trovebla, bonkora, gaja, helpema, ideoriĉa kaj findinda en ĉiu situacio.



Kurt Jentsch †


Ankoraŭ ni memoras, kiam li sen multaj vortoj kapjesis, transpreni la komplikan taskon de l'kasisto en LKK Fulda. Li majstris ĝin same komplete kiel modeste. Li poste same senbrue portis alian ŝarĝon, nome la oficon de GEFA-kasisto dum la jaroj 1968 ĝis 1974. En Darmstadt, kie li deĵoris antaŭ sia emeritiĝo, li fondis Esperantogrupon. Apude li amatoris kiel fotografemulo kun propra hejma laboratorio. Sed lia speciala kaj plej multe amata „infano“ estis la Migra Ekspozicio, kiun li kelkfoje novkonstruis kaj pluevoluis laŭ ĉiam novaj ideoj. Kaj li havis la ĝojon, ke ĉiuj vidantoj de tiuj diversaj ekspozicioj estis vere impresitaj per la abunde kaj lerte kompilita materialo. Sennom-

brajn horojn li „investis“ en sian laboron por ni.

Kaj la afabla Kurt Jentsch ĉie trovis amikojn. Li komprenis la esencon de Esperanto kaj utiligis ĝin ankaŭ helpe de multaj kontaktoj trans la limojn. Li ligis la praktikon kun la idealoj, kiuj ambaŭ havas siajn lokojn en la Internacia Lingvo. Kun li forpasis vera esperantisto, kies manko sendube estos akre sentebla. Ne nur per vortoj, sed el niaj koroj ni certigas, ke ni konservos lian bildon en nia memoro kaj ne forgesos nian amikon Kurt.

Al la estimata vidvino ni aparte kondolencis.

Por la estraro kaj membraro  
Gießner  
Prezidanto



Vartrajno sur la Tauern-linio dum vintro (foto ÖBB)

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Germana Esperanto Fervojista Asocio.